# La Hodiaŭa Ĵurnalo

2018-01-27 n-ro 429


# Deklaro de Universala Esperanto-Asocio okaze de la Tago de Holokaŭsta Memoro



Efrîn: La kurdoj petas de la Konsilio de Eŭropo kaj de Unuiĝintaj Nacioj, ke ili agadu por ĉesigi la turkan invadon

Palestino rifuzas ekskluzivi Jerusalemon el intertraktado kun Israelo

Turkio ne diskutos kun Usono pri sekura zono en Sirio antaŭ ol restarigi reciprokan fidon

**La Hodiaŭa Ĵurnalo**

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

**Misio**
Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro
kaj grafikisto: Rafael S. Lima
Revizianto: Andrej A. Peĉënkin [Андрей А. Печёнкин]

**Kontakto**
hodiauajurnalo@gmail.com

*Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.*

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopinias kun ties aŭtoroj.

*Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.*

Farita per: Scribus

Deklaro de Universala Esperanto-Asocio okaze de la Tago de Holokaŭsta Memoro
*27-an de januaro p. 03*

*Efrîn*: La kurdoj petas de la Konsilio de Eŭropo kaj de Unuiĝintaj Nacioj, ke ili agadu por ĉesigi la turkan invadon
*«For la turkan invadon en Efrîn» p. 04*

Turkio ne diskutos kun Usono pri sekura zono en Sirio antaŭ ol restarigi reciprokan fidon
*Donald Trump promesis, ke Usono ne liveros armilojn al kurdaj armitaj fortoj p. 04*

Rusio: Plua milita ĉeesto de Usono en Sirio malobservas internacian leĝon
*Rezolucio 2254 de la Sekureca Konsilio p. 05*

Palestino rifuzas ekskluzivi Jerusalemon el intertraktado kun Israelo
*Malgraŭ ajna decido de la Usona flanko p. 05*

Davoso: aktivistoj manifestacias kontraŭ la Monda Ekonomia Forumo
*Pluraj miloj da personoj manifestaciis ankaŭ en Zuriko kaj Berno p. 06*

Elton Jhon anoncis sian emeritiĝon
*71-jaraĝa p. 06*

Hodiaŭe
*Gábor Garai; Ilja Ehrenburg; Lewis Carroll; kaj Miĥail Saltikov-Ŝĉedrin p. 07*

# Deklaro de Universala Esperanto-Asocio okaze de la Tago de Holokaŭsta Memoro

Ĉiujare la 27-an de januaro Unuiĝintaj Nacioj rekonas la Tagon de Holokaŭsta Memoro, la tagon de la liberigo de la ekstermejo *Auschwitz-Birkenau* kiun starigis la Nazioj kiel parton de sia programo de genocido. Temas pri tago de funebrado, ĉiujara promeso neniam forgesi tiujn kiuj mortis nek la monstrecon de la genocido kiu detruis ilin, kaj tago kiam la popoloj de la mondo estas alvokataj eldiri la vortojn “Neniam Plu” – neniam plu oni permesu ke tiaj barbarismaj agoj okazu.



La Esperanto-movado aparte funebras tiujn kredantojn pri internaciismo kaj internacia kompreniĝo kiuj, ĉu pro sia raso ĉu pro siaj politikaj aŭ aliaj konvinkoj pereis je la manoj de la nazioj. Inter ili estis ĉiu rekta familia posteulo de L.L. ZAMENHOF, fondinto de Esperanto, escepte de unu sola transvivanto – kaj inter ili estis multnombraj esperantistoj en Germanio, Pollando, Hungario, Ĉeĥoslovakio kaj aliloke. Ili inkluzivis esperantistajn ŝtatoficistojn, instruistojn, kuracistojn, ĵurnalistojn, poetojn. Kaj inter la travivantoj estis ankaŭ esperantistaj herooj kiuj ŝirmis aliajn for de ekstermiĝo.

Temas ankaŭ pri tago kiam ni memoras tiujn kiuj ne rezistis aŭ ne povis rezisti tiun tiranecon kaj buĉadon; kaj ni promesas, antaŭ la ekzemplo de la Holokaŭsto, kontraŭstari maljustecon kie kaj kiam ajn ĝi okazas. Ni memoras la vortojn de la esperantista poeto Leen DEIJ, kiu en 1948 esprimis sentojn kiuj rilatas al ĉiuj gentoj kaj ĉiuj religioj.

***Al la juda foririnto***

*Li fermis la kofron,*
*manpremis – adiaŭ!*
*Sen ia protesto li*
*iris… Hodiaŭ*
*mi tion komprenas; li*
*povis nur miri,*
*ke mi, la kristano, lin*
*lasis foriri.*

*Kun kapo klinita la*
*kofron li portis.*
*Li iris la vojon al*
*Auschwitz kaj mortis*
*sen ia protesto… Li povis nur miri,*
*ke mi, la kristano, lin lasis foriri.*

*Kaj iam la filo kun filo parolos,*
*kaj tiu demandos, la veron li volos.*
*La mia silentos… kaj povos nur miri,*
*ke mi, la kristano, lin lasis foriri.*

*Ni sentis kompaton kaj monon kolektis,*
*dum kelkaj el ni la infanojn protektis.*
*Sed Auschwitz ekzistis! Nu, kion plu diri?*
*Ke mi kaj ke vi… ni lin lasis foriri.*

Rafael Henrique ZERBETTO, el UEA
El Popola Ĉinio

# *Efrîn*: La kurdoj petas de la Konsilio de Eŭropo kaj de Unuiĝintaj Nacioj, ke ili agadu por ĉesigi la turkan invadon




La kurdaj reprezentantoj petis de la Konsilio de Eŭropo kaj de la Unuiĝintajn Naciojn, ke ili agadu por ĉesigi la turkan invadon en *Efrîn*.

La manifestaciantoj svingis flagrubandojn «For la turkan invadon en *Efrîn*», «Hieraŭ *Kobanî*, hodiaŭ *Efrîn*» kaj kondamnis la turkan registaron skandante «Erdoğan faŝisto, teroristo».

La maldekstra deputitino Gokay Akbulut, la deputitoj de la Demokratia Partio de la Popoloj (HDP) Filiz Kerestecioğlu, Feleknas Uca, Ertugrul Kurkcu kaj Hisyar Ozsoy partoprenis la manifestacion.

La deputito de la maldekstra partio esprimiĝis dum la manifestacio. Li admonis Unuiĝintajn Naciojn kaj la Konsilion de Eŭropo, ke ili pli vigle agadu por akiri pacon en la regiono.

Akbulut kritikis ankaŭ la Germanan federan registaron pro ĝiaj rilatoj kun Turkio.

Kerestecioğlu substrekis la ĵusajn arestadojn de personoj, kiuj dividis mesaĝojn en la sociajn retojn kontraŭ la invado de *Efrîn* kaj deklaris: «Paco kaj volo al nova vivo ne povas esti forpuŝitaj».

Kerestecioğlu deklaris, ke la libereco de la Kurdoj kaj la libereco de la turka popolo venkos.

La deputitoj de la HDP, Uca kaj Kurkcu, ankaŭ admonis la internaciajn potencojn, ke ili intervenu por haltigi la turkan invadon en *Efrîn*.

Neniam Milito Inter Ni

---

# Turkio ne diskutos kun Usono pri sekura zono en Sirio antaŭ ol restarigi reciprokan fidon



Turkia Ministro pri Eksterlandaj Aferoj Mevlüt Çavuşoğlu [mevˌlyt ˈtʃavuʃˌoːɫu] diris ĵaŭde [25 jan 2018] en Istanbulo, ke Turkio ne povas diskuti kun Usono pri fiksado de sekura zono en Sirio antaŭ ol restarigi reciprokan fidon.

Çavuşoğlu faris la rimarkojn dum komuna gazetara konferenco kun sia aŭstra paralelulo Karin Kneissl. Li diris, ke usona ŝtatsekretario [Ministro pri Eksterlandaj Aferoj] Rex Tillerson esprimis la ideon fiksi sekuran zonon profundan je 30 kilometroj sur la siria teritorio proksima al Turkio, tamen Turkio kaj Usono unue devas restarigi reciprokan fidon antaŭ ol diskuti pri similaj demandoj.

Çavuşoğlu emfazis, ke Usono ne observis sian promeson al Turkio, kaj pro tio estis difektita reciproka fido inter la du flankoj. Li aldonis, ke Prezidento Donald Trump promesis, ke Usono ne liveros armilojn al kurdaj armitaj fortoj, kaj Turkio observos liajn agojn.

Yu
Ĉina Radio Internacia

# Rusio: Plua milita ĉeesto de Usono en Sirio malobservas internacian leĝon

Proparolanto de Rusia Ministerio de Eksterlandaj Aferoj Marija ZAĤAROVA diris ĵaŭde [25 jan 2018], ke Usono malobservas internacian leĝon per sia sentemplima milita ĉeesto en Sirio.



ZAĤAROVA faris la rimarkojn en regula gazetara konferenco. Ŝi diris, ke la 17-an de januaro, Usona ŝtatsekretario [Ministro pri Eksterlandaj Aferoj] Rex TILLERSON diris, ke Usono konservos sian militan ĉeeston en Sirio. Ŝi asertis, ke la usona decido malobservas internacian leĝon kaj ne helpas politikan solvadon de la siria konflikto surbaze de Rezolucio 2254 de la Sekureca Konsilio.

ZAĤAROVA aldonis, ke Rusia Ministro pri Eksterlandaj Aferoj Sergej LAVROV eble ĉeestos la nacian dialogon de Sirio, kiu okazos en la rusia urbo Soĉio la 29-an kaj la 30-an de januaro. La Rusia Ministerio de Eksterlandaj Aferoj invitas proksimume 1 600 reprezentantojn el diversaj rondoj de Sirio kaj delegitojn de UN kaj aliaj internaciaj organizoj ĉeesti la nacian dialogon.

Yu
Ĉina Radio Internacia

# Palestino rifuzas ekskluzivi Jerusalemon el intertraktado kun Israelo

Responde al la freŝa deklaro de Usona Prezidento Donald TRUMP pri palestina-israela paco, la palestina flanko akcentis ĵaŭde, ke ili rifuzas ekskluzivi Jerusalemon el la pacintertraktado kun Israelo kaj ne timas usonan minacon.



TRUMP diris dum la renkontiĝo kun Israela Ĉefministro Benjamin NETANYAHU en *Davos* ĵaŭde [25 jan 2018], ke la demando pri Jerusalemo ne estos plu metita en la tagordon de la Palestina-Israela intertraktado. Li diris ankaŭ, ke Usona Vicprezidento Mike PENCE ricevis malvarman akcepton de la palestina flanko dum sia vizito al Mez-Oriento, kaj Usono frostigos monhelpon al Palestino ĝis ĝia reveno al la tablo de intertraktado.

Palestina Ministro pri Eksterlandaj Aferoj Riyad AL-MALKI diris, ke malgraŭ ajna decido de la Usona flanko, la demando pri Jerusalemo ĉiam estos sur la tablo de intertraktado. Palestina ĉefreprezentanto pri intertraktado Saeb EREKAT publikigis komunikaĵon, asertantan, ke sen Jerusalemo, ili ne povas komenci la intertraktadon kun Israelo.

Yu
Ĉina Radio Internacia

# Davoso: aktivistoj manifestacias kontraŭ la Monda Ekonomia Forumo

Pluraj miloj da personoj manifestaciis ankaŭ en Zuriko kaj Berno, Svislando.




Davoso, «paradizo de la banditoj», estis legeble sur tiuj flagrubandoj. Lundon [22 jan 2018] vespere, alimondismaj manifestaciantoj provis, pli-malpli facile, defiladi en la svislanda skistacio, antaŭ ol esti arestitaj de la polico.

«Tio ne estas vera manifestacio, ĉar ni ne havas la eblecon manifestacii, kiel diris la aŭtoritatoj, pro la neĝo. Do ni nur paŝadas kaj kantadas kun niaj malgrandaj flagrubandoj, kaj ni ankaŭ promenados noktomeze», rakontis aktivisto.

Specife celata de la manifestaciantoj, unu el la partoprenantoj ĉe la Ekonomia forumo: Donald TRUMP. La usona prezidento, konata pro siaj kritikoj de la libera komerco, estas atendata en Davoso ekde ĵaŭdo. Sed liaj opoziciuloj kiel ĉi tie en Zuriko, kritikas ĉefe lian politikon pri naturmedio.

Neniam Milito Inter Ni

---

# Elton JHON anoncis sian emeritiĝon

Per gazetara intervjuo merkrede la 24-an de januaro en Nov-Jorko (Usono), la brita kantisto Elton JOHN anoncis sian lastan tutmondan muzikrondiron, okazontan ekde septembro kaj finiĝonta en 2021.



“Mi estas 71-jaraĝa. Fizike mi ne plu povas vojaĝadi. Mi volas resti hejme. Mi deziras hejmajn travivaĵojn ĉe miaj filoj. Mi havis nekredeblan vivon, sed ĝi nepre ŝanĝiĝas”, tion diris li, kiu geedzece vivas kun la kina reĝisoro David FURNISH.

Tiu anoncita adiaŭa muzika rondvojaĝo, nome “*Farewell Yellow Brick Road*”, enhavos 300 spektaklojn.

Paulo Cesar PIRES
esperanto.blog



## Gábor Garai


**Gábor Garai, hungare Garai Gábor, Esperante Gabrielo Garai estis hungara poeto kaj tradukisto. Naskiĝis la 27-an de januaro 1929 en Budapeŝto. Li mortis la 9-an de septembro 1987 en Budapeŝto.**

**En Esperanto aperis: poemoj en *Hungara Antologio*.**

**Vikipedio**

---

## Ilja Ehrenburg




**Ilja Grigorjeviĉ Ehrenburg (ruse** Илья́ Григо́рьевич Эренбу́рг, **naskiĝis la 27-an de januaro 1891 en Kievo, mortis 31-an de aŭgusto 1967 en Moskvo) estis rusia kaj sovetia poeto kaj verkisto.**

**En Esperanto aperis: *Post la konferenco en Ĝenevo; La kvara pipo; Ĉu povas fil' de suda ardo.***

**Vikipedio**

---



## Lewis Carroll

**Charles Lutwidge Dodgson [ĉarlz latviĝ dods'n], pli bone konata laŭ la nomo Lewis Carroll (naskiĝis la 27-an de januaro 1832 en *Daresbury*, *Cheshire*, Anglio - mortis la 14-an de januaro, 1898 en *Guildford*) estis angla matematikisto kaj logikisto, sed kio famigis lin estis lia verkado de groteskaj, humuraj fantastaj romanoj, kiuj origine estis destinitaj por la amuzo de infanoj.**

**En Esperanto aperis: *La aventuroj de Alicio en Mirlando; Trans la spegulo; La Ĵargonbesto*.**

**Vikipedio**

---

## Miĥail Saltikov-Ŝĉedrin



**Miĥail Jevgrafoviĉ Saltikov (ruse Михаил Евграфович Салтыков) estas granda rusa verkisto. Li uzis la literaturan pseŭdonomon Ŝĉedrin (Щедрин). Li naskiĝis la 27-an de januaro 1826 (n.s.) en bieno *Spas-Ugol*, *Tver* gubernio, Rusia Imperio. Li mortis la 10-an de majo 1889 en Sankt-Peterburgo.**

**En Esperanto aperis: *La trompulo gazetisto kaj la kredema leganto.***

**Vikipedio**